La lasta tago de la Kongreso estis la sabato, 21a de julio. Matene la kongresanaro vizitis la Muzeon Jovellanos, kiu tiam troviĝis en Cimadevilla, en la naskiĝdomo de Jovellanos. La Direktoro de la centro, post afable akcepti la kongresanojn, faris, en la hispana lingvo, la prezentadon de la pentraĵoj kaj aliaj objektoj tie ekzistantaj. Iu samideano de nia E-grupo tradukadis esperanten tiun prezentadon ĉefe por la fremdaj kongresanoj kiuj ne konis la hispanan idiomon.

Je la 5a horo vespere de tiu tago estis en la salono de la kongresejo (Katedro Jovellanos) teatra spektaklo; la polaj geaktoroj, Zbigniew Dobrzyński kaj ĉi ties edzino Kalina Pieńkiewicz, de **POLA ESPERANTISTA TEATRO**, ludis la teatr-verkon "La Hipnoto". La teatr-ludado meritis la aprobon kaj la aplaŭdadon de la spektantoj.

Sekve, en la sama salono, okazis la Solena Fermo de la Kongreso. En tiu akto oni faris la liveradon de la diplomoj al tiuj gelernintoj kiuj aprobis la ekzamenon pri Esperanto farita antaŭ kelkajn tagojn.

La Prezidantino Urueña, en sia fina interveno, resumis la plej gravajn atingojn de la Kongreso. Oni prezentis al la kongresanaro kaj ĉi tiu aprobis, jenajn rezoluciojn:

Unue: Peti de la "Asturia Ŝparkaso" ekonomian helpon por eldoni la prelegon "Esperanto kaj la Eŭropaj Internaciaj Organismoj" de la Prezidantino en la Universitato de Oviedo.

Due: Komisii la Lokan Kongresan Komitaton por ke, nome de la kongresanaro, ĝi insistu ĉe la Urbestro de Oviedo, por la inaŭguro de iu strato en tiu urbo kun la nomo "Esperanto".

Trie: Rekomendi al ĉiuj hispanaj Esperanto-Grupoj intensigi siajn proprajn interrilatojn, kaj plifortigi tiujn al **HEF**.

Kvare: Agnoskante la rajton de ĉiu popolo uzi sian propran lingvon, intensigi la instruadon de Esperanto kiel plej taŭgan rimedon por la intergenta kompreniĝo.

Kvine: Komisii la **HEF**-estraron por ke ĝi faru sian eblon por revivigi la Junularan **HEF**-Sekcion.

Sese: Akcepti la proponon de Madrida Esperanto-Liceo organizi la venontjaran kongreson en Madrido.



**En la kongresa bankedo**



**Polaj geaktoroj teatr-ludante "La hipnoto"-n**

La lasta programero de la Kongreso estis la "Espicho--Vespermanĝo, regiona speciala manĝeto kun multe da cidro, kiu okazis en la etniisma muzeo "Pueblo de Asturias" ("Astura Vilaĝo"). Tiu akto estis financita de la Urbestraro de Gijón. Dum la vespermanĝado dancis por la kongresanaro iuj folkloraj grupoj de la urbo.

La resumo de ĉi tiu E-Kongreso kun sidejo en nia urbo kaj organizita de nia esperantista grupo estas ke ĝi rezultis sufiĉe brila kaj bone organizita, sen pliaj incidentoj ol tiu de la loĝado en la Labora Universitato. Ne ĉiuj enloĝintoj en tiu loko ŝanĝis la gastejon, kaj por tiuj, kiuj restis tie, dum la kongresaj tagoj funkciis specialaj aŭtobusoj.

Alia rimarkinda afero estis tiu de la loka presaro. En la unua tago de la kongreso estis presara intervjuo al la Prezidanto Santiago Mulas, kaj el iu radio-stacio estis telefonalvoko por peti informon pri la kongreso. Ĉar tiumomente ne troviĝis tie la Prezidanto, informis al ili la Sekretario.

Nia Grupo ricevis, post la kongreso, la ekonomian helpon donacitan de la **Provinca Deputitejo**.